

RNDR. Evžen Wohlgemuth

La vivo de efemeroj

La efemeroj (ĉeĥe "jepice") estas konata grupo de insektoj. Kutime oni uzas la vortojn "efemera vivo", kiuj signifas ion tempe tre mallongan. Kiel vivas la efemeroj, ke ilia nomo fariĝis tiel konata?

La efemeroj - memstara ordo de tre primitivaj insektoj - havas diversajn grandecojn, la plej grandaj atingas longecon de la korpo ĝis 20-25 mm. Sur la brusto ili havas 2-4 parojn de flugiloj. Ĉi tiuj flugiloj estas triangulformaj, la antaŭa paro estas pli granda ol la malantaŭa. Kiam la efemero sidas, ĝi starigas siajn flugilojn same kiel la tagaj papilioj. Sur la fino de la abdomeno havas efemeroj 2-3 longajn kaj maldikajn apendicojn. La efemeroj vivas ĉe akvoj, oni povas vidi ilin precipe sur plantoj. Ili ne havas buŝon, tial ili ne povas sin nutri. Sekve de tio ilia vivo estas tre mallonga, plimulte nur iom da horoj aŭ tagoj. Unu sola funkcio de la vivo de maturaj efemeroj estas reproduktado.

La ovoĵ estas metataj en akvo, ĉe kelkaj specioj en stagnanta, ĉe aliaj en fluanta. Ĉi tie eloviĝas larvoj. Ilia korpo estas longforma, kun folioj de traĥeaj blankoj sur la flankoj de la abdomenaj artikoj kaj kun 3 longformaj apendicoj sur la ekstremo de la abdomeno. La larvoj vivas sian tutan vivon, kiu daŭras ĉe grandaj specioj 2-3 jarojn, ĉe malgrandaj 1 jaron, en akvo. Ili voras algojn, restojn de plantoj, organikajn restojn ktp. Kreskantaj larvoj estas ĉe grandaj specioj ĝis 30 mm longaj. Ili elgrimpos el akvo, la haŭto sur ilia brusto krevas, kaj aperas la matura efemero. Apenaŭ sekiĝinte ĝi ekflugas.

Ĉe ni vivas ĉirkaŭ 80 specioj de efemeroj. Iliaj larvoj estas tre abundaj en diversaj tipoj de akvoj, la larvoj de iuj specioj indikas puran akvon. La larvoj de efemeroj estas grava parto de fiŝa nutraĵo. La grandaj specioj de efemeroj en la pasinteco abundis en grandaj riveroj. La maturaj efemeroj ekflugis tie en grandaj amasoj. Ankoraŭ nuntempe oni povas vidi svarmojn de efemeroj, kvankam ne tiel grandajn kiel antaŭe.

Sur la bildeto estas matura efemero kaj larvo de la duflugila efemero. Larvoj de ĉi tiu specio (la elkreskintaj longas 7-10 mm) vivas en stagnantaj akvoj, ofte ankaŭ en ĝardenaj basenoj. Maturajn efemerojn oni povas vidi ankaŭ en urboj sur dommuroj, pordoj, fenestroj ktp.